STARTO

N-ro 3/2026 (300)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto John Huang

Ĉeĥaj partoprenantoj en UK Graz

Starto:
organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Čtvrtletník Českého esperantského svazu, z.s.
č. 300, 57. ročník, vyšlo dne 5. 9. 2026 ve Svitavách
Vydavatel: Český esperantský svaz, z.s. náměstí Míru 81/1, Město, 568 02 Svitavy, IČO 00 44 30 34
Registrace MK ČR E 18147, ISSN 1212-009X
Periodicita: 4 x ročně

E-mail:cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.
Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Membrokotizoj: A 400 Kč (Starto elektronike 290 Kč), B 300 Kč (elektronike 190 Kč), C 150 Kč, P 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1700 Kč, rete: 900 Kč, rete por ĈEA-anoj: 500 Kč; Marček: 1900 Kč, rete: 1100 Kč, rete por ĈEA-anoj: 700 Kč, Cink por progresintoj 2950 Kč, rete: 1400 Kč, rete por ĈEA-anoj: 1100 Kč.

Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: blindula, ILEI, katolika, kristana, grupo por ciferecigado, (memstariĝis: handikapitoj kaj fervojistoj)

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Reteja grupo: redakce@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltrancaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:
2800 186 228/2010
Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz**:** (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, jubileoj, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (web, online komunikace a nástroje)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio (+ ILEI):
Milan Kolka, Bučovická 939/12
627000 Brno, tel. 608 421 404,
cefdelegito@esperanto.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Milan Kolka.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity
www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

LA 111-a UNIVERSALA KONGRESO EN GRAZ
1 – 8 aŭgusto 2026

La 111a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la urbo Graz, kiu estas la dua plej granda urbo de Aŭstrio. La urbo havas 660 000 loĝantojn. Aŭstrio estas konata pro siaj sekureco, alta vivnivelo kaj riĉa kultura heredaĵo.



Ĝi estas grava lando por komponistoj. La urbon trafluas la rivero Mur. La dominanta grandega Horloĝturo sur la monteto Schlossberg estas bone videbla de ĉiuj lokoj. Ĉi-jare Aŭstrio estas la tria lando en la historio, (post Pollando kaj Kroatio), kiu deklaris Esperanton nemateria kultura heredaĵo. Kiu sekvos?

Graz la unuan fojon gastigis UK-on, al kiu enskribiĝis pli ol 1100 geesperantistoj el 63 landoj. La plej multaj kongresanoj venis el Germanio, Pollando kaj Francio. La evento okazis en impona historia konstruaĵo de la urbocentro, la kongresa palaco kun kelkaj belege ornamitaj salonoj. La malfermo, la fermo kaj ĉiuj posttagmezaj kaj vesperaj kulturaj programeroj, kiuj vere abundis, okazis en la belega salono Zamenhof.

Tre belaj kaj okulfrapaj estis verdaj Esperanto-sakoj. En la tramoj kaj busoj sur ekrano videblis reklamo pri la kongreso. Ankaŭ pluraj aŭstraj periodaĵoj informis pri la evento kaj la televido elsendis novaĵojn pri la kongreso. Do, la civitanoj estis vaste informitaj. Antaŭ la kongresejo oni povis praktiki Ĉatkalinan – iuspeca dancado per klako de manoj, kiu originas el Bulgario. Ekde nun ĝi eble disvastiĝos dank' al Esperanto. Efektive, en la kongresa programo estis io por ĉiu. Multaj kongresanoj profitis urbajn ekskursojn por malkovri ĝiajn belaĵojn kaj historiaĵojn. En la urbo troviĝas muzeoj, galerioj, parkoj, ripozejoj. Elstaras nekutima arkitekturo de la artdomo "Kunsthaus". Esperanto estas konata en Graz, ĉar tie okazis jam pluraj Esperanto-eventoj. Ne malproksime de la centro troviĝas Esperanto-placo kun impona monumento. Pro la varmego, la futbalmatĉo iniciata antaŭ 12 jaroj en Argentino, ĉi-foje ne povis okazi. La ŝatata kongres-kuriero "Grazeto" aperis papere nur unu fojon. Poste oni povis ĝin havi nur elektronike, kion bedaŭris pli aĝaj personoj.

Kiel kutime sabatan vesperon okazis la tradicia Movada Foiro, kie diversaj esperantistaj organizoj kaj asocioj informis pri sia ekzisto, prezentis siajn estontajn aranĝojn kaj varbis novajn anojn.

Dimanĉon la 1-an de aŭgusto inaŭguriĝis la 111-a UK per festparolado de la prezidanto de UEA Fernando Maia. La ceremonion ĉeestis ankaŭ kelkaj honoraj gastoj. Ĉe la fino estis kantata la E-himno kaj post tio la kongreso estis malfermita.



La ĉeftemo de la kongreso estis: "La volontulado". Ĝi estis amplekse pritraktata en grandnombre ĉeestataj prelegoj kaj diskutoj. La bunta semajna programo havis kunvenojn de esperantistaj medicinistoj, komercistoj, sciencistoj, instruistoj, fervojistoj, kaj aliaj asocioj. Okazis kurso pri la aŭstra-germana lingvo, kaj pluraj prelegoj rilataj al Aŭstrio. Gejunuloj havis sian propran programon kaj ankaŭ infanetojn oni okupis diversmaniere. Tre aprezataj kaj frekventataj estis la paroligaj lecionoj gvidataj de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge. Ili en amuza formo prezentis kursojn por komencantoj kaj spertigis progresantojn. Okazis KER-ekzamenoj.

Esperantlingvaj aŭtoroj prezentis siajn verkojn dum la aŭtoraj duonhoroj. En la libroservo estis ekspoziciataj ne nur diversaj libroj, sed ankaŭ aliaj esperantaĵoj por vendi.

Esperanto-Provence propagandis kaj varbis por la venontjara Eŭropa kongreso okazonta (14.-17.05.2027) en la sudo de Francio, proksime al la urbo Marsejlo. Same okazis por la 9-a afrika kongreso en Togolando (26.-31.12.2026). En alia okazo oni parolis kaj logis por projektoj de la kulturdomo – kastelo Greziljono.

Lundo estis dediĉita al la klerigado. Marde, la tradicia kongresa programo "Tago de lernado" prezentis plurajn interesajn prelegojn kaj estis samtempe AMO-seminario. Same kiel lastjare en Brno, ankaŭ ĉi-jare okazis la "Ĉina Tago". En la koridoro oni povis admiri belan foto-ekspozicion: "75-jara jubileo de Ĉina Esperanto-Ligo".

Merkredo estis rezervita al tuttagaj ekskursoj. Unu el ili gvidis ĝis Maribor en Slovenio. Dum tiu tago la kongresejo estis fermita. Pluraj partoprenantoj faris sian propran programon. En la parko de Graz estis plantita arbo por memori tiun ĉi kongreson.

Ne eblas mencii ĉiujn programerojn, do mi citos nur kelkajn: interesa prelego pri Madagaskaro, pri La Esperanto-muzeo de la aŭstria Nacia biblioteko, pri aŭstraj gekomponistoj kaj kulturo, pri ĉina Teoceremonio, pri sciencaj prelegoj: IKU (Internacia Kongresa Universitato, SK (Scienca Kafejo), SUS (Scienca Universitata Sesio), pri AI (Artefarita Inteligenteco), pri Traduk-konkurso Vejdo kaj la fotokonkurso de ILEF (Internacia Ligo de Esperantistaj Fotistoj).

Ne mankis omaĝoj al gravaj forpasintaj esperantistoj, kant-ateliero de Kajto, Belartaj konkursoj, Aŭkcio, kongresaj Bankedo kaj Balo, venontaj Uk-oj, Internacia Arta vespero. Impresis Orgena koncerto. Nekutima kaj alloga estis programero "Astrofiziko renkontas muzikon"- surekrana prelego pri efektoj de la procedoj en la universo kun muzik-akompano, kreis fascinan rigardon al la misteroj de la kosmo.



Dum la nacia vespero prezentiĝis la loka folklorgrupo kun belaj dancoj, El Kroatio plezurigis nin la grupo Golub (Kolombo) per bukedo de belkantoj, kiuj pliriĉigis la kongresanojn. Unuafoje estis prezentita interkultura spektaklo "Sorĉe de verda stelo". La kongreso estis tre sukcesa malgraŭ la varmego, kiu regis ĉi-somere en la tuta Eŭropo. Necesas danki al la organizantoj de tiu ĉi impona evento kaj antaŭĝoji pri la venontjara Uk en Aŭstralio de la 3-a ĝis la 10-a de julio 2027.

Liba Gabalda



REZOLUCIO DE LA 111-A UK EN GRACO, AŬSTRIO

La 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazinta en Graco (Graz), Aŭstrio, kun 1138 aliĝintoj el 62 landoj kaj teritorioj, traktis la temon "Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo" kadre de la Internacia Jaro de Volontuloj por Daŭripova Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN). La UK mem, kiu okazas ĉiujare, estas konkreta ekzemplo de internacia volontula kunlaboro: ĝi ebliĝas danke al la sindona laboro de multaj volontuloj el diversaj landoj.

Volontulado kiel forto de la Esperanto-movado

La Esperanto-movado ekde sia komenco vivas per diversfona volontula engaĝiĝo kaj havas fierindan kaj daŭran historion da mondplibonigaj agadoj. Ĝiaj valoroj – interalie respekto de homaj rajtoj, internacia solidareco, homa emancipiĝo kaj transnacia edukado – profunde kongruas kun la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) difinitaj de UN, nomataj ankaŭ Agendo 2030.

Tra la mondo esperantistoj kaj esperantistaj organizaĵoj jam kontribuas al tiuj celoj per agadoj pri edukado, kulturo, socia inkluziveco, genra egaleco, respekto de la naturo, mediprotektado, internacia solidareco, packonstruado kaj aliaj kampoj, ofte kunligante lokan agadon tutmonden.

Daŭripova evoluigo ankaŭ en nia propra agado

La kongreso konstatas, ke la vojoj por atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo estas ankoraŭ tre longaj kaj ke ofte la decidantoj ignoras ilin, kvankam 2030 alproksimiĝas; eĉ kelkaj celoj malproksimiĝas anstataŭ progresi.

La kongreso instigas ĉiujn esperantistojn kaj esperantistajn organizaĵojn ne nur subteni la CDE-ojn, sed ankaŭ pli vaste apliki iliajn principojn en la propra agado. Daŭripoveco ne rilatas nur al tio, kion ni faras, sed ankaŭ al tio, kiel ni laboras, organiziĝas kaj kunlaboras.

La kongreso aparte instigas la Esperanto-organizaĵojn evoluigi strukturitajn volontulajn programojn, kiuj ebligas al homoj engaĝiĝi, kunlabori translime, lerni kaj transdoni spertojn, aparte atentante la bonfarton, motiviĝon kaj daŭripovan engaĝiĝon de siaj volontuloj.

Esperanto en la internacia civitana socio

Volontulado estas integriga, memstara kaj nemalhavebla formo de civitana partopreno. Volontula kaj profesia agadoj havas malsamajn, sed reciproke kompletigajn rolojn kaj nek povas nek devas anstataŭi unu la alian.

La atingo de la CDE-oj postulas kunagadon inter forta civitana socio, entreprenoj kaj respondecaj publikaj institucioj je loka, landa kaj internacia niveloj. La kongreso instigas la Esperanto-movadon plene kaj aktive partopreni tiun civitanan kunlaboron kaj plifortigi siajn ligojn kun aliaj organizaĵoj kaj iniciatoj.

Lingva justeco kaj internacia kunlaboro

La kongreso atentigas, ke la lingva dimensio de la CDE-oj restas tro ofte subtaksata. Lingva justeco kaj egala internacia komunikado estas gravaj antaŭkondiĉoj por efika, paca kaj respekta internacia kunlaboro. Laŭ la kongreso gravas, ke ĉiuj registaroj respektu la lingvajn rajtojn de siaj malplimultoj kaj subtenu multlingvismon. La kongreso ankaŭ substrekas, ke lingva justeco ne limiĝas al la protekto de minoritataj lingvoj, sed etendiĝas ankaŭ al egaleca internacia komunikado inter ĉiuj popoloj.

Tial la kongreso reasertas la valoron de Esperanto kiel lingvo de egaleca kaj egaliga internacia komunikado, kiu faciligas kunlaboron trans lingvaj kaj kulturaj limoj kaj kontribuas al pli justa, inkluziva kaj daŭripova mondo, emfazante, ke Esperanto estas agnoskita de Aŭstrio kiel nemateria kultura heredaĵo kaj lingvo de kulturo. Esperanto povas doni ŝlosilan kontribuon al la atingo de la celoj de UN.

Alvoko

La kongreso bedaŭras la nunan tendencon al repolusigo de la mondo en influzonojn, kiuj favoras mensogojn, timigadon kaj solvon de malekvilibroj per forto kaj milito anstataŭ per dialogo kaj respekto al internacia juro.

La kongreso esprimas sian subtenon al la centra rolo de UN en la kunordigado de internacia kunlaboro por daŭripova evoluigo kaj instigas la membroŝtatojn provizi ĝin per la necesaj rimedoj, kompetentoj kaj politika subteno por efike plenumi tiun rolon.

La kongreso aparte alvokas atenton je la lingvaj aspektoj de la CDE-oj aparte rilate justan lingvouzon por kvalita edukado, redukton de malegaleco kaj aliron al justico.

Fine, la kongreso alvokas ĉiujn esperantistojn konkretigi la inspiron de ĉi tiu kongreso en agoj kaj projektoj por la CDEoj, pli ofte kaj pli konscie uzi Esperanton, ankaŭ novige, kiel laborlingvon de internacia civitana kunlaboro.

Novaj honoraj membroj de UEA

■ el Aŭstrio **Martin Stuppnig**;
■ el Nederlando **Ans Bakker-ten Hagen**;
■ el Francio **Renée Triolle**;
■ el Pollando **Barbara Pietrzak**;
■ el Belgio **Paul Peeraerts**;
■ el Slovakio **Jozef Reinvart**;
■ el Kubo **Maritza Gutiérrez González**;

je ilia memoro:

■ el Aŭstrio **Hans Michael Maitzen**
■ el Kroatio **Ivo Osibov**.

La Komitato ankaŭ elektis kiel **Honoran Prezidanton de UEA** je lia memoro **Probal Dasgupta** (Barato), kiu prezidis UEA en la periodo 2007-2013. Legu nekrologon sur p. 86.



S-ro Martin **STUPPNIG (1925-2026)**, aŭstra fervojisto, honora membro de IFEF, aŭtoro de militaj rememoroj *Menschlich in der Unmenschlichkeit: Kriegsimpressionen* esperantigitaj de Jozefo Horvath kiel ***Home en senhomeco: Militaj impresoj***. Bedaŭrinde li forpasis semajnon post la kongreso kiel 101-jara.



S-ino Ans **BAKKER-ten HAGEN** (1941), nederlanda esperantistino, dum kvar jardekoj subtenanto kaj mecenato de UEA, TEJO, Societo Zamenhof kaj Instituto Hodler 69'.



S-ino Renée **TRIOLLE (**1943), franca esperantistino kaj emerita instruistino de la rusa lingvo. Ŝi apartenas al plej aktivaj organizantoj de la movado en Francio, kunfondinto de Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO), iama ĝenerala sekretariino de TEJO, poste de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), prezidantino de Esperanto Provence, reprezentas la movadon ĉe Unesko, aŭtorino de lernolibroj, en 2012 ŝi ricevis Diplomon pri Elstara Agado.



S-ino Agnieszka Barbara **PIETRZAK** (1944), pola ĵurnalistino, tradukistino, estrarano de UEA inter 2007 kaj 2013, membro de la **Akademio de Esperanto** ekde 2011, reprezentanto de UEA en la **Fondumo Zamenhof** en Bjalistoko. Ŝian voĉon konas ĉiuj aŭskultantoj de Esperanto-elsendoj de la Pola Radio.



S-ro **Paul PEERAERTS** (1946) flandra lingvisto, ĵurnalisto, membro de la **Akademio de Esperanto,** redaktoro de nederlandlingva revuo ***Esperanto-Panorama*** (1970-1990), de la revuo ***Sonorilo*** (1972-1974). Inter 1976 kaj 1979 li prezidis la Esperanto-grupon ***La Verda Stelo*** en Antverpeno. En 1979 li fariĝis direktoro de la **Grafika Centro de UEA** en Antverpeno kaj poste de **Flandra Esperanto-Ligo** (ĝis 2011), unu el ĉefaj kunlaborantoj de la internacia revuo ***Monato,*** inter 2007 kaj 2017 gvidis la esperantlingvan tradukistan skipon de la socia retejo **Ipernity,** ekde 2017 li kunlaboras en la multlingva tradukista projekto **Tatoeba**.



Inĝ. **Jozef REINVART** (1951), slovaka diplomato, estrarano de **EEU**, aktiva en **Premio Cigno**. Legu artikolon en la pasinta Starto 2/2026, p. 59, okaze de lia vivjubileo.



S-ino **Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ** (1960), kuba ĵurnalistino, tradukistino, membro de la **Akademio de Esperanto** (ekde 2019), dum pli ol kvar jardekoj ŝi apartenas al la plej aktivaj kaj internacie konataj reprezentantoj de la Esperanto-movado en Latinameriko. Ŝi prezentis la soneldonaĵojn ***Juliano kantas*** kaj ***Latinamerika mozaiko***, ambaŭ eldonitajn en Havano en 1997. En 2018 UEA distingis ŝin per la **Diplomo pri Elstara Agado**.



D-ro **Hans Michael MAITZEN** (1943-2026), profesoro pri astronomio ĉe la Universitato de Vieno. Li estis prezidanto de **TEJO,** membro de **IKUE,** multjara senatano de la **Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)**. Li kunlaboris pri la astronomiaj terminoj de la **Nova Plena Ilustrita Vortaro**. En la lastaj jaroj de sia vivo li kuntradukis kun R. Fössmeier du sciencajn librojn pri la vivo kaj laboro de **Nikolao Koperniko** kaj **Ludwig Boltzmann.** UEA distingis lin per la **Diplomo pri Elstara Agado** (2013). Ni konas lin el niaj KAEST-oj. Post longa malsano li forpasis du semajnojn antaŭ la kongreso.



Prof. **Ivo OSIBOV** (1937-2026), kroata juristo, universitata instruisto, dum pli ol sep jardekoj aktive servis al la loka, landa kaj internacia Esperanto-movado. Li gvidis multajn kursojn en Esperanto-Societo Split, Esperanto-Societo Bude Borjan kaj la Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo, kies kunfondinto kaj unua sekretario li estis. Li estis ankaŭ ofta preleganto en internaciaj Esperanto-renkontiĝoj kaj kongresoj. En la jugoslavia kaj kroata movado li servis kiel aktivulo kaj komitatano de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio, Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj Kroata Esperanto-Ligo. Li estis ankaŭ sekretario de Kroata Esperanto-Ligo kaj redaktis la junularan rubrikon **La Juna Vivo** en la revuo *Esperanto*. Lia internacia agado aparte frue ligiĝis al **TEJO**. Li fariĝis estrarano de TEJO en 1959 kaj estis ĝia prezidanto inter 1964 kaj 1968. De 2001 ĝis 2004 li estis estrarano kaj Ĝenerala Sekretario de UEA, dum multaj jaroj membro de Societo Zamenhof. Li forpasis en junio 2026.

Premio Deguĉi por 2026

al **Kuba Esperanto-Asocio (KEA)**.

Elstara Agado

Tianjin-a Esperanto–Asocio / TEA (Ĉinio) – Esperanta Ambasadejo de Poŭzalegro (Brazilo) – Walter Klag (Aŭstrio) – Herbert Mayer (Aŭstrio) – Ewald Schick kaj Martin Gritsch (Aŭstrio) – Ranja Zafinifotsy (Madagaskaro) – Norma Cescotti Covelli (Italio) – Agnar Fitjar (Norvegio) – Przemysław “Pŝemek” Wierzbowski (Pollando, je lia memoro)

Elstara Arta Agado

Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma / Kajto (Nederlando) – Alekso Miller (Usono) – Carlos Alfredo Aragón Guerrero (Kolombio/Brazilo) – Herbert Mayer (Aŭstrio) – Przemysław “Pŝemek” Wierzbowski (Pollando, je lia memoro)

REZULTO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2026

BRANĈO POEZIO
1 **Praatomo** de Jubert Cabrezos el Filipinoj. 2 **Jen perfekto!** de Serĝo Sire el Francio kaj **Muziko en min** de Cho Sung Ho el Sud-Koreio. 3 **Persimono sunas** de Choe Taesok el Koreio/Litovio kaj **Uragano** de Carmel Mallia el Malto.

BRANĈO PROZO
1 **Pafilo el milia tigo** de Wei Yubin el Ĉinio. 2 **Promesita lando** de Laimundas Abromas el Litovio. 3 **Kiel Diablo detruus la junan generacion** de Jens Spillner el Germanio.

BRANĈO MIKRONOVELO
1 – premio Paula Adúriz – **Iam** de Francisco Javier Moleón el Hispanio. 2 **Genezo** de Amri Wandel el Israelo. 3 **Atendante Panjon** de Jorge Rafael Nogueras el Portoriko (Usono) kaj **Laĝardeno** de Evgenij Georgiev el Kazaĥio. Honora mencio estas aljuĝita al **La Baleno** de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

BRANĈO TEATRAĴO
1 **La leĝo estas la leĝo** de Evgenij Georgiev el Kazaĥio. 2 ne aljuĝita. 3 **La Kaptito de Neustrelitz** (La Terpomoj de la Duko) de Ralph Glomp el Germanio.

INFANLIBRO DE LA JARO
aljuĝita al la Eldonejo "Esperanto-Asocio de Britio", pro la verko **Stig de la ŝutloko** de Clive King, tradukata de Jack Warren.

BRANĈO ESEO
1 - premio Luigi Minnaja - **Inter silento kaj atesto** de Nicola Ruggiero el Italio.

BRANĈO KANTOTEKSTO
1 **Gitaristo** de Ewa Barbara Grochowska el Francio. 2 **Valsi por forgesi** de Ewa Barbara Grochowska el Francio. 3 **Bona vento** de Benoît Philippe el Germanio. Honora mencio aljuĝita al **Kanto de plagiatisto** de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

SUBBRANĈO SCIENCFIKCIO KAJ FANTASTO
1 – premio Charles Power – **La kronikoj de Nautilus: Vaganta laboratorio** de Evgenij Georgiev el Kazaĥio. 2 **Ĉu forstisto?** de Vladimir Opletajev el Rusio kaj **La skribmaŝino** de Debra Hamel el Usono. 3 **Relumigu viajn karajn** de Jorge Rafael Nogueras el Usono/Portoriko. Honoraj mencioj: **Kial ne edziniĝi kun 64310?** kaj **En la tunelo 140-A** ambaŭ de Jorge Rafael Nogueras el Usono / Portoriko.

laŭ Miguel Gutiérrez Adúriz
Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA

Novelo-konkurso

La **kvina eldono** de la **Interkultura Novelo-Konkurso (INK-5)**, lanĉita en Aruŝo (Tanzanio) kun la temo "**La detalo kiu ŝanĝas ĉion**", anoncis siajn gajnintojn dum la 111-a UK en Graco (Aŭstrio).

Multnombra partopreno en INK-6
Intertempe, lastjunie estis ricevitaj la lastaj kontribuaĵoj al la **sesa eldono de INK (INK-6)**, kun la temo "**Proksime al la celo**". Entute alvenis **2030 konkursantaj noveloj** de aŭtoroj el 69 landoj en Norda kaj Suda Amerikoj, Eŭropo, Afriko, Azio kaj Oceanio. Rezultoj estos anoncitaj en **julio 2027**, dum la **112-a UK en Melburno/Narrm (Aŭstralio)**. Ĉiuj informoj troveblas en la retejo https://bobelarto.ink/.

AI kaj Esperanto

Petr Chrdle

Enkonduke mi konfesu, ke komputilo ne estas mia amiko. Kvankam mi ĝin uzadas ĉiutage, ĝi restas por mi nur plibonigita tajpilo kaj se ekaperas en la ekrano io neatendita, mi devas voki helpon de pli saĝa amiko. Des pli tio validas pri mia rilato al interreto, kiun mi uzadas nur laŭbezone: rete komuniki, elserĉi, kion mi bezonas kaj uzadi elektronikan bankon; neniu vizaĝlibro (facebook) aŭ aliaj sociaj retoj, neniu blogado, filmoj, …

Ĉar nun ĉie oni aŭdas kaj legas pri la artefarita intelekto, ankaŭ mi, malkomputilisto kaj scivolemulo, komencis kun ĝi eksperimenti – kaj nun mi koncize priskribos miajn spertojn.

1e: Laŭ konsiloj de spertuloj mi elektis du **AI-sistemojn: ChatGPT kaj Gemini** kaj laŭ mi ambaŭ estas similaj kaj sufiĉe helpemaj eĉ en senpaga versio (ĉar miaj eksperimentoj estis ampleksaj, mi tamen decidiĝis ĉe ChatGPT transiri al la plej favora pagata versio po 200 CZK monate.

2e: Mi petis AI **desegni** virtualan renkontiĝon de Komenio kaj Zamenhof sidantaj ĉetable, sur kiu estu terglobo kaj ie en la bildo lumo. Ĝi sendis al mi tri proponojn, unu el ili mi elektis kaj uzis por la kovrilo de mia verko *Světlo porozumění*. Do – mia unua praktika rezulto.

3e: Mi petis ĝin helpi al mi pritaksi la opinion de esperantistoj pri la utileco lerni lingvojn en la tempo de jam sufiĉe fidindaj tradukiloj kaj artefarita intelekto. Post interesa diskuto ĝi instruis min kiel utiligi *Google.Forms* kaj **prepari enketon inter la ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj;** en la ĉeĥa, por ke povu partopreni ankaŭ komencantoj.

Partoprenis 112 esperantistoj en la aĝo inter 20 kaj 94 jaroj, meza aĝo preskaŭ 65 jaroj. Rigardante niajn relative etajn Esperanto-komunumojn tio estas certe interesa kaj ne neglektinda specimeno. Pro koncizeco mi ne priskribu detalojn, sed nur la konkludon.

Evidentiĝas, ke plejparto de esperantistoj ne perceptas Esperanton nur kiel lingvon servantan por faciligo de interkompreniĝo, sed pli kiel koncepton de vivostilo, ĝuado de komunumo kaj ilo por ligo de interkulturaj rilatoj. Alivorte, por plejparto de ili pli gravas la reto de homoj kun similaj valoroj ol la nura lingva sistemo.

Samtempe la enketo montris konsiderindan grandon de realismo. Nur tre raras la atendo, ke Esperanto devus fariĝi tutmonda komunikilo. Plejparte oni respektas la dominan rolon de la angla, same kiel forton de teknikaj rimedoj faciligantaj interkomunikiĝon kaj aliflanke limigitan nombron de aktivaj uzantoj de Esperanto. Tamen tio ne kondukas al rifuzo de Esperanto. Male, la valoro de ĝi pli kaj pli vidiĝas en la konkretaj spertoj de individuoj, anstataŭ en la atendo de tutmonda venko.

Jen eble unu el la plej interesaj tendencoj en la nuna Esperanto-movado. Dum pli fruaj generacioj ofte asociis Esperanton kun vizio de estonta, pli justa lingva ordo de la mondo, hodiaŭaj uzantoj emfazas ĝiajn personajn avantaĝojn. Por ili Esperanto ne estas tiom projekto por la estonteco, kiom vivanta parto de la nuntempa vivo.

Tio tamen ne signifas rezignacion pri la originalaj idealoj. La ideo de lingva egaleco, reciproka kompreno kaj respekto inter nacioj restas tre forte ĉeestanta en la respondoj. La diferenco kuŝas pli en la fakto, ke ĝi estas ankrita en la ĉiutaga sperto de specifaj homoj ol en grandaj sociaj vizioj.

Alia tre pozitiva trajto: mi estis surprizita, kiom malmulte da amareco estis en la respondoj. Mi atendis pli da plendoj pri la fiasko de la movado, la malkresko de la membraro, aŭ la hodiaŭa mondo. Anstataŭe, mi trovis abundon da personaj rakontoj, humuro, perspektivo kaj dankemo. Mi resumu mian impreson de la enketo-rezultoj en unu frazon:

Esperanto eble ne ŝanĝas la mondon hodiaŭ tiel, kiel iuj esperis antaŭ cent jaroj, sed ĝi tamen ludas signifan pozitivan rolon por la vivoj de ĝiaj uzantoj.

4e: Mi provis AI kiel **helpanton dum verkado** (kaj en la ĉeĥa, en Esperanto kaj en la germana), **kaj dum la tradukoj** al kaj el la samaj lingvoj. Ĝiaj konsiloj estis plejparte tre utilaj kaj ŝparis al mi multe da tempo. Ne ĉion mi akceptis, kelkfoje mi kun AI kvereletis, sed mi povas pritaksi, ke ĝi ŝparis al mi duonon de la bezonata tempo.

5e: Plian eksperimentadon mi fokusigis al eblo **utiligi AI dum lernado aŭ perfektigo de fremdaj lingvoj**. Kiel modelan lingvon mi uzis Esperanton, sed ĝi aplikeblas al ajna lingvo. La rezulto estis miriga! Ĝi ne nur kontrolas tradukojn, preparas ekzercojn, klarigas erarojn, eksplikas gramatikaĵojn laŭpete en la lernata lingvo aŭ en la gepatra, sed eĉ helpas prepari onin por la internaciaj ekzamenoj de la nivelo A1 ĝis C. Mi tre rekomendas elprovi ĝin almenaŭ kiel konzultanton dum siaj lingvaj studoj.

6e: AI iugrade **fariĝas mia komputilisto**. Ekde kiam mi amikiĝis kun AI, jam mi devis fronti kelkajn problemojn. Do antaŭ ol serĉi en manlibroj aŭ voki homan helpon, mi klarigis la problemon al la AI kaj sub ĝia gvido mi sukcesis solvi plurajn ĝisnunajn problemojn.

Tamen atentu: oni ne rajtas blinde kredi al ĉio. Necesas konscii pri la fakto, ke ankaŭ AI, same kiel viva persono, eĉ instruisto, povas erari. Ankaŭ al mi tio okazis, sed ekzemple dum la praktikado de lingvoj vere esceptokaze.

Resume: Mi forte rekomendas al ĉiuj, kiuj ĝis nun ne utiligis AI, provi *amikiĝi* kun ĝi. Mi estas la ekzemplo, ke ĝi povas esti utila ankaŭ por simpla uzanto de komputilo.

Drahomíra Plašilová

Tra urbo Graco fluas rivero Mur. Sur la sama rivero okazis Ĉampionado de Eŭropo Masters en kajaka slalomado en la urbo Rupert. En kategorio 65+ nia Drahuška PLAŠILOVÁ – anino de nia Rondeto Klementinka en Mladá Boleslav – gajnis oran medalon.

Sur sia jako ŝi portas esperantajn surskribojn.

Jindřiška Drahotová
Mladá Boleslav



En Svitavy sonis Esperanto!

Kaj eĉ ĉe infanoj ekde trijaraj, kiuj kantis al ni esperantlingve. Sed ni komencu de la komenco.

Jam fine de la pasinta kalendara jaro kontaktis sinjoro Mietlinski el Pollando persone nian klubon, informante, ke jam dum pluraj jaroj li aranĝas internacian konkurson de infankantoj, en kiu regule partoprenas plejparte infanoj el Pollando kaj Litovio. Ĉiu kantas unu kanton en sia gepatra lingvo kaj alian en Esperanto. Ĉu ni volus esti partoprenantoj en tiu projekto, kiu proksimigas Esperanton per netradicia formo precipe al la junularo, en la jaro 2026?



Ne eblis respondi tuj, unue ni devis tradiskuti la tutan eventon en la klubo, akiri por ĝi membrojn, aranĝi anticipe la loĝadon kaj manĝadon por ĉirkaŭ 25 homoj (tio sukcesis danke al bona kunlaboro kun la elementa lernejo Svitavy en la strato Riegrova), kontroli la uzeblon de la salonego, kontakti sponsorojn, kaj aranĝi anticipe la reklamadon. Ĝi ne estis facila amuzo, sed ni sukcesis kaj povis promesi, ke ni partoprenos kaj realigos la eventon, kiun ni nomis "Internacia Infankanto", rekte en Svitavy, ĉe la adreso de la Klubo - en la Ottendorfer-domo. Tamen ni ne volis koncepti la tutan eventon nur kiel konkurson, sed kiel prezentadon kaj reklamadon de Esperanto ĝuste per kanto.

Kaj tiam komenciĝis la formika laboro, kiun prenis sur siajn ŝultrojn ĉefe la kluba prezidantino Libuše Dvořáková, kaj ankaŭ aliaj membroj laŭ siaj ebloj partoprenis. Ni diris al ni mem: "kiu sin enjugis, devas tiri". Kaj ni ankaŭ alparolis niajn kontaktojn en Slovakio kaj baldaŭ ni havis la promesitan partoprenon de reprezentantoj de la kantgrupo "Lúč" el Liptovský Hrádek. Do ne kantos nur poloj kaj litovoj, sed ni vastigis la repertuaron je kantoj el Ĉeĥio kaj Slovakio. Fine montriĝis preskaŭ plej malfacile trovi ĉeĥajn interpretistojn, sed danke al proksima kunlaboro kun la ensemblo *Zpěvné ženy* (Kantemaj virinoj), kie ankaŭ kantas klubanino Hana Moravská, ni sukcesis. La antaŭlernejajn infanojn akompanis per gitaro Helena Mazáková, panjo de la plej junaj infanoj. Samtempe estis preparataj konkretaj diplomoj kaj afiŝoj, pli precize difinataj la postuloj por manĝado kaj loĝado, pri muziko, sonigo de la salono kaj pri transporto, okazis intertraktadoj kun sponsoroj kaj ĉe la oficoj. La sukceson pruvas la sponsorado kaj transpreno de la patronado fare de la urbo Svitavy.

Kun la paso de la tempo okazis diversaj ŝanĝoj. Estis ia trankviliĝo por ni, ke sinjoro Mietlinski certigis buson por sia tuta grupo kaj ni ne plu bezonis serĉi tra-

noktadon por partoprenantoj el Pollando kaj Litovio. La nomoj de la infanoj kaj diplomoj estis korektataj, kaj kiam la fino de junio alproksimiĝis, ĉio estis preta. Kompreneble, ni volis scii kiel preparo por la evento progresas kaj ankaŭ ni volis iom prepariĝi por la infana prezentado en Svitavy. Do tri klubaj reprezentantoj iris la tagon antaŭe - la 18-an de junio 2026 - al Klodsko, Pollando, kie pasintece okazadis la supre menciita konkurso. Libuše Dvořáková estis en la ĵurio kaj du aliaj membroj atente sekvis la disvolviĝon de la evento. Post reveno al Svitavy, ni klarigis kelkajn detalojn, dum aliaj klubanoj koncentriĝis pri la grupo el Slovakio, gvidata de ĥorestrino Bronia Majerčíková. Kompreneble, la tuta ensemblo "Lúč" ne povis veni, sed ankaŭ venis pianistino kaj repetitora akompanantino Magistrino Želmíra Chovancová kaj tri pintaj kantistinoj el la ensemblo. Ili rigardis Svitavy ne nur de la trotuaroj kun ĉiĉeronado de Vlasta Burešová, sed ankaŭ el birdoperspektivo - de la preĝeja turo, kun bone bazita klarigo de Jan Richter.

Kaj venis vendredo, la 19-a de junio. Ekde la frua mateno grupo el Slovakio ekzercis siajn kantojn, alvenis la infanoj el "Kantemaj virinoj" kaj cizelis siajn prezentojn, kaj post nelonge la buso el Pollando jam estis ĉi tie. Rapide ŝanĝi vestojn, manĝeti, testi la akustikon kaj sonsistemon, kaj je la 10-a horo ĝi komenciĝis, ĝuste kiel planite. Multaj spektantoj ankaŭ venis por aŭskulti nekutiman por ili lingvon, Esperanton. Lernantoj el pluraj klasoj de la jam menciita lernejo - "Riegrovka" - kun intereso spektis la eventojn sur la scenejo. La tutan eventon malfermis Libuše Dvořáková, kaj post la himno de Esperanto, kiun la grupo el Litovio bele ekzercis, komenciĝis la individuaj prezentadoj. Klare, ke estis videbla timo, la laŭtparoliloj en la salono iom strikis, sed por la plejparto de la publiko ĝi estis neforgesebla sperto. Krom kantado, ankaŭ la dancoj de la malgranduloj estis interesaj, ankaŭ ligitaj al la kanto, kaj kiam la trijara Meda Mazáková kantis kanton en Esperanto kun sia iom pli aĝa frato Oskar, la aplaŭdoj daŭris longe. Sed ĉio finiĝas, kaj tiel ĉi tiu internacia evento finiĝis. Ĝi ne estis konkurso, do ĉiu el la partoprenantoj ricevis diplomon kaj donacojn kaj suvenirojn, kaj post mallonga promenado tra Svitavy, la buso denove ekiris al Pollando.

Sed ni ankoraŭ ne liberlasis la grupon el Slovakio iri hejmen. Ni pretigis programon por ili por la posttagmezo kaj vespero, kaj sabate matene ili bele kantis por ni ĉe la inaŭguro de la nova ekspozicio en la Esperanto-Muzeo. Sed tio estas alia ĉapitro.

Ni kredas, ke la evento estis sukcesa, ni kapablis disvastigi konscion pri Esperanto kaj ĝiaj eblecoj al pli vasta rondo de la publiko, precipe inter junuloj. Kaj ne temis nur pri kantado, sed ankaŭ pri reklamado de la Esperanto-Muzeo, reklamado de Svitavy, kaj sekve, reklamado de Ĉeĥio. Ni konvinkiĝis, ke similan eventon eblas prepari kaj organizi, se esperantista klubo funkcias kaj la membroj ardas por la afero. Eble la Asocio povus pripensi, kiu klubo transprenus la gvidadon kaj organizus ĉi tiun eventon venontjare. Ni volonte kundividos niajn kontaktojn kaj spertojn.

En la nomo de Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy Miroslav Sýkora

REF 2026

La 47-a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj okazis proksime de Brno, en skolta bazejo Kapral-muelejo meze de naturo (de la 20-a ĝis la 30-a de julio 2026). Aliĝis 22 familioj (63 personoj el 14 landoj). Ĉeĥa Radio Brno elsendis interparolon kun geedzoj Krupa (slovaka edzo kaj latva edzino). Ne temas pri klasika renkontiĝo por ĉiuj esperantistoj, sed nur por familioj, en kiuj Esperanto estas aktive uzata. Samtempe tie tendumadis Verdaj Skoltoj.

Polyglot Gathering 2026

En la sama loko kiel pasintjare, nome en Mendel-universitato en Brno, okazis ankaŭ ĉi-jare renkontiĝo de poliglotoj, ŝatantoj de lingvoj (27 – 31 majo 2026).



Organizis esperantistoj, partoprenis ankaŭ pluraj ĉeĥaj esperantistoj. Plej multaj prelegoj estis en la angla, sed oni povis aŭdi ankaŭ aliajn lingvojn (pli ol cent prelegoj, plie koncertoj).



Pasioj de Antonín Píč

Tiel nomiĝas ekspozicio de litomiŝla denaskulo Antonín Píč (1896-1967), patro de esperantista verkisto Karel Píč. La ekspozicio estis solene malfermita unu tagon antaŭ la muzika festivalo Smetana-Litomiŝlo, en tiel nomata Portmoneum de Josef Váchal (ĵaŭde la 11-an de junio 2026).



Antonín Píč laboris en la urba magistrato, okupiĝis pri muziko, komponis, kun muzikbando akompanis amatoran teatron, orgenludis en preĝejo. Sed plej ĝoje li pentris kaj skizis. Li vidis, kiel Josef Váchal pentris la Portmoneum. Amikeco kun Josef Portman lin gvidis al kolektado de ekslibrisoj. Li mem plurfoje gravuris libromarkon.

Danke al Esperanto li komunikis kun la mondo kaj esperantistigis ankaŭ sian filon Karlon. Esperanton li eĉ instruis kelkan tempo en lernejo. La vernisaĝon partoprenis multnombra idaro de Antonín Píč, kiu havis 8 infanojn en du geedzecoj. Venis ankaŭ du duonfratinoj de Karel. La ekspozicio restos ĝis la 4-a de oktobro 2026. Apud multaj bildoj kaj ekslibrisa kolekto vi povos vidi eĉ propramane kompilitan esperantan vortareton kaj korespondaĵojn kun eksterlando.

Libuše Dvořáková



Stalin kaj Esperanto

En 2005 la eldonejo Fontana eldonis ĉeĥe libron de B. S. Ilizarov "Sekreta vivo de Stalin". Sur la paĝo 155 estas informoj, kiujn lingvojn Stalin sciis aŭ almenaŭ provis lerni. Inter ili estis ankaŭ Esperanto, kiun li lernis en ekzilo kiel estontan lingvon de Internacio. Sed kiam li fariĝis reganto, li senkompate esperantistojn persekutis. (*Atentigis A. Švubová*)

Ni povas aldoni, ke Stalin verkis ankaŭ siajn konceptojn pri lingvistiko kaj pri estonta internacia lingvo. La lingvistoj rifuzas liajn opiniojn, sed pozitive estis, ke li forigis konceptojn de lingvisto Marr, kiu siajn opiniojn proklamis unu sola marksista teorio, persekutis aliajn opiniojn kaj tiel haltigis disvolviĝon de la soveta lingvistiko. Tion komentis jam Jiří Kořínek en la gazeto Esperantista 4/1951, p. 33.

Logika alfabeto

I i, (Y y), E e, A a, O o, U u ŭ, M m, N n, R r, L l, J j, P p, B b, T t, D d, K k, G g, C c, (Dz dz), Ĉ ĉ, Ĝ ĝ, F f, V v, (W w), S s, Z z, Ŝ ŝ, Ĵ ĵ, Ĥ ĥ, H h, (Q q), (X x).

Tiel povus aspekti Esperanta alfabeto, se ĝi estus ordigita ne laŭ hazardo, sed laŭ estiĝo de sonoj en la parolorganoj, unue vokaloj, poste konsonantoj senvoĉaj/voĉaj. Simile la kazoj havus logikan ordigon: nominativo vokativo akuzativo genitivo lokativo dativo instrumentalo.

Ing. Martin Dokoupil
M.Dokoupil@email.cz
Vrbátky-Olomouc
Ĉeĥio

Václav Zouzalík – nova kunordiganto de Wikidata



Ekde julio 2026, la teamo de Wikimedia Ĉeĥa Respubliko estas plifortigita per nova kunordiganto de la programo Wikidata/Tech – Václav Zouzalík. Li aliĝas al la asocio post pluraj jaroj da laboro kiel programisto por Ruby, sed ankaŭ estas delonga membro de la komunumo...

Esperanto en libro de Jiří Grygar

Astronomo Jiří Grygar en 2024 eldonis siajn rememorojn **Du jarcentoj en la vivo de esploristo**. Sur la paĝo 108 li mencias konferencon en Rusio, kie kelkaj parolantoj prelegis en Esperanto. Jam en Starto 3/1984, p. 17-18 aperis respondo de J. Grygar al unu esperantisto pri la gazeto *Homo kaj kosmo*.

Motivoj por lerni Esperanton

Novaj enketoj ricevis respondojn: facila lerneblo, internacia komunikado, lingva egaleco dum interparolo, tutmonda amikeco, paco kaj interkompreniĝo, justa estonteco, vojaĝoj plenaj de senco, kulturo kaj literaturo, legado de artikoloj kaj libroj, intelekta disvolviĝo, ekzercado de cerbo, intereso pri lingvoj ĝenerale, idealoj, scivolemo, praktika uzeblo, familia tradicio, partopreno en internaciaj eventoj, verkado, kontribuado al Vikipedio.

(laŭ H. Seburoho kaj P. Chrdle)


Germana-ĉeĥa renkontiĝo en Olomouc
22 – 24 majo 2026

La unua komuna kongreso okazis en 1993 en Karlovy Vary, en la hotelo Thermal. Ekde tiam niaj asocioj ne sukcesis la aranĝon ripeti. Nur ĉi-jare, kvankam ne plene. Germanoj havas sian kongreson printempe, ni aŭtune. Do por germanoj temis pri kongreso, por ni pri renkontiĝo.

Elektita estis la urbo Olomouc, kiu posedas multajn historiajn memoraĵojn kaj grandegan parkon, ĉar Olomouc estas ankaŭ urbo de floroj, ĝi ĉiujare gastigas vizitantojn de ekspozicio Flora Olomouc. En la parko troviĝas restoracio Fontana simila al malgranda historia kastelo kaj tie okazis la ĉefa programo.



Loĝado estis sekurigita en *Hotelový dům* proksimume 1 km malproksime.



Vendrede dum komuna vespermanĝo en Fontana oni konatiĝis kaj aŭskultis unuajn prelegojn.



Anton Oberndorfer prezentis sian metodon de lingvolernado per poemoj, Ewald Schick invitis ĉiujn al UK 2026 en Graz kaj Jiří Tomeček prelegis pri Olomouc, kie li junaĝe studis.

Matenmanĝo estis en la hotelo kaj je la 9-a horo en Fontana komenciĝis la Germana Kongreso. Ĉeĥoj intertempe ludis keglojn aŭ promenis tra la parko.

Tagmeze ĉiuj renkontiĝis ĉe la tagmanĝo en Fontana kaj posttagmeze promenis tra la urbo sub gvido de J. Tomeček.

Post vespermanĝo denove en Fontana oni aŭskultis prelegon *Misinfomoj pri Esperanto. Kion scias lingvistoj kaj ŝtatoficistoj?* de Lu Wunsch-Rolshoven. Sekvis vingustumado de blankaj kaj ruĝaj vinoj de la regiono.

Dimanĉo estis dediĉita al tutaga ekskurso, kiu gvidis la partoprenantojn al

Muzeo de Esperanto en Svitavy kaj Muzeo en Česká Třebová, kie troviĝas grava kolekto de Esperanto-libroj devenantaj grandparte el la biblioteko Šustr de la praga klubo, post kiam la klubo perdis sian ejon kaj devis ĉiujn librojn fortransporti. La germanaj gastoj miris, ke ni havas du muzeojn en najbaraj urboj, sed en Česká Třebová estas la tuta kolekto en deponejo, alirebla nur por esploristoj, dum en Svitavy estas ekspozicia ĉambro por la publiko.

Vespere en Fontana Petr Chrdle prelegis pri *Mondaj heredaĵoj en la teritorio de Ĉeĥio* kaj estis prezentita video de Vladimír Türk *Historio de trampa movado en Ĉeĥio*.

Kiuj restis ĝis lundo, povis aŭskulti prelegon de Mirka Tomečková *Dezerto en mi* kaj de Jirka Tomeček *Historio de la regiono*.



En la menciita parko troviĝas ankaŭ Esperanto-arbo plantita en 1932 okaze de la 5-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso kaj Esperanto-ŝtono kun la koncerna informo. Partoprenantoj tie renkontiĝis por malgranda rememora soleno. Parolis Martin Haase kaj Libuše Hýblová.

Proksime de la ŝtono estas elirejo el la parko al la strato *Zamenhofova*.



Eble la renkonto startigis novan kunlaboron?

-mm-

Eksprese

■ Universala Kongreso 2027 estos en la aŭstralia **Melburno** kaj UK 2028 en litova **Kaŭno**.

■ Ĉi-septembre la Londona Esperanto-Klubo (LEK) lanĉas novan serion de semajnaj **retaj Esperanto-kursoj** ekde komencantoj (A1) ĝis progresintoj (C1). Vi povas trovi la plenan liston de la kursoj ĉi tie: https://kursaro.net

■ Gazeto **Slovjani.info** dediĉas sin al interslava komunikado kun resumoj en Esperanto, Interlingua, angla, germana, hispana, franca, itala. Eldonas Slava Unio, Cejl 892/32, http://slovane.org.

■ **Vyprávěnky**, de junaj esperantistoj el la tuta mondo, el gazeto Juna Amiko enĉeĥigis Jindřiška Drahotová, 150 Kč, tel. 720 652 320.

■ **Internacia Junulara Kongreso** kunigis junajn esperantistojn en la kataluna **Tiana** (8 – 15 aŭgusto 2026). **IJK 2027** okazos en la germana **Petzow** proksime de Berlino (15 – 22 aŭgusto 2027).

■ 25 jaroj de **Societo Zamenhof**, rondo de donacantoj kaj mecenatoj de UEA.

■ En Graz okazis la unua **Kongreso de Virinoj** (KoVi).

■ Esperantisto-fizikisto Bruce Sherwood honorita **per medalo Oersted** kune kun Ruth Chabay pro instruado de fiziko.

Sukcesa bone defendis

En Starto 1/2025, p. 22, ni publikigis leteron de ĉina studentino pri ĵurnalismo SuXin, kiu sin nomas prefere Sukcesa por neĉinoj. Ŝi interesiĝas pri niĉ-ĵurnalismo, kiu ne celas al vasta publiko, sed al tre specifa. Al ŝi plaĉas nia Starto kaj ĉi-jare venis foto kun vortoj „Sukcesa bone defendis“ de ŝia instruistino Alessandra Madella.



Sur la ekrano legeblas: *Esperanta niĉ-ĵurnalismo kaj komunikila konvergo: La ĉeĥa revuo 'Starto'*.

Dankon kaj gratulon.

mm

Kuro por Paraple



En la maja kuro por „Paraple“ atingis Esperanto-teamo la 7-an lokon.

E-mental'

plu aktivas, ne nur per kuro por „Paraple“, sed ankaŭ per aranĝo Ludu kun ni.

Ludu kun ni en Brno (7.6.)



Krom keglado en la ĝardeno de Mendel-muzeo la partoprenantoj vizitis ankaŭ ekspozicion de insektoj en Moravia Landa Muzeo.

Ludu kun ni en Česká Třebová (13.6.)



Pola E-kongreso

23 – 26 julio 2026



Niaj najbaroj kongresis en Bielsko-Biała, partoprenis pli ol 130 personoj, eĉ koreoj. Du ekskursoj, kantis Kajto, Verda Banano, JoMo kaj SuMi. Milan Kolka prelegis pri Stránská Skála en Brno.

Esperantistoj de Svitavy denove en montaro

Kiel tradicie ankaŭ ĉi-somere la Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy entreprenis kvintagan konigan ekskurson. Denove en montaron. Per demokratia voĉdonado en la klubejo ni elektis por ni malmulte konatan montaron Šumava.

En la prepara procedo necesis certigi bonkvalitan tranoktejon por 14 klubanoj, kompreneble kun naĝejo, prepari programon kaj ĉion antaŭe interkonsenti. Venis mateno la 30-an de junio kaj ni povis ekvojaĝi. Celo – komunumo Nezdice en taŭga veturdistanco de la urbo Sušice.

Survoje kompreneble interesaj haltoj – ruino de burgo Orlík apud Humpolec, belvidejo ĉe bierfarejo en Humpolec, de tempo al tempo necesis replenigi likvojn kaj kaloriojn, kaj antaŭvespere ni estis en la pensiono. Enloĝigo, naĝejo kaj rilakso .... Kaj mojosa „gasteja kvizo“, kiun preparis Honza Richtr kun Jana Moláčková.

Nezdice estis nia centro kaj disaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon ebligis ekkoni belegajn lokojn. La unuan tagon post la alveturo ni trarigardis burgon Velhartice kaj pene grimpis al belvidejo Svatobor, trarigardis urbon Sušice kaj burgon Rabí, sekvan tagon ni ekvojis al Klostermann-pado kaj venis ĝis Klostermann-belvidejo, esploris ski-areon Zadov kun belvida skisaltejo, ni trairis Modrava, Kvilda, rigardis Lagomarĉon, Čeněk-segejon ĉe kunfluo de riveroj Křemelná kaj Vydra….

Kaj vespere babilado kaj societaj ludoj kaj naĝejo. Ĉefa celo de plua tago estis burgo Kašperk kun interesa klarigo de ĉiĉerono, proksima bastionruino Pustý kaj urbo Kašperské Hory. Ni haltis eĉ en Dobrá Voda kun muzeo de Šimon Adler kaj preĝejo de sankta Vintíř (Guntero). Kaj la vespero jam proksimiĝis, reveno al la pensiono, rostumado, societaj ludoj, babilado, naĝejo ...

Kaj satdormi por sekva tago – tago de reveno. Estis sabato kaj ni ekvojis reen al la hejmo. Survoje ni haltis en Písek. Tiom da memoraĵoj kaj sablaj statuoj ĉe antikva ponto, belego! Parto da klubanoj veturis tra Telč kaj ankaŭ tie estis vidindaĵoj. Vespere ni jam estis hejme kaj dimanĉon ni dediĉis al rilaksado. Ni akordiĝis, ke la ekskurso estis belega kaj en la unua septembra kluba kunveno ni komencos planoj, kien ni ekskurson venontjare.

Miroslav Sýkora

OKAZE DE LA ĈEA-KONFERENCO EN PODĚBRADY 25.-27. 9. 2O26

En anticipa espero, ke la gastiganta urbo estos omaĝita per pli honora famo ol estis la historia evento, kiu okazis en la pasinteco…

…kiam post la ekzekuto ruĝiĝis kverkoarbo kaj el puto elŝprucis sango…

En historiaj kronikoj de la reĝa urbo Poděbrady estas la 11-a de a**ŭ**gusto 1496 enskribita per ruĝaj literoj…

La ekzekutista glavo tiam apud la Elbo-ponto dehakis kapojn de la min-laboristoj, kiuj jam ne plu toleris despotismon de avidaj minej-mastroj. La masakro estas en la ĉeĥa historio traktita per kelkaj aŭtoroj, diversmaniere. La popola fantazio pliriĉigis la eventon per vico da mistikaĵoj.

Fino de la 15a jarcento. La ministoj en la arĝent-minejoj en Kutná Hora laboris neelteneble klopode, sed akiris apenaŭ por sia ĉiutaga pano. El ilia penlaborego multon gajnis la minej-oficejaro, kaj precipe riĉiĝis la reĝa majesto…

La kutnohoraj ministoj laŭtvokiĝis… Laŭdire la unuajn elstarojn oni ankoraŭ kvietigis, sed kiam la neeltenebla premado daŭris, post du jaroj iliaj kvereloj fariĝis publikaj ribeloj. Vane ili skribis, sendis deputitojn en Pragon, en Budan, kie tiam rezidis la reĝo Vladislao Jagellona.

La evento komenciĝis je la 13-a de julio 1494, kiam ekstartis centoj da kut-nohoraj ministoj al proksima altaĵo Špimberk kaj tie ili tendarumis, esper-ante, ke tia ago devigos la sinjoraron kun ili trakti. Anstataŭ la diplomatia traktado estis alvokitaj la armekipitaj trupoj el Kolín, Čáslav kaj Poděbrady, kiuj ĉir-kaŭis la tendaron kaj la bedaŭrindajn ministojn ekprizonigis. La dek tri de-putitoj de la ministoj, kiuj foriris al Poděbrady por esperebla traktado, falis „sub protekton“ de la senhonora hetma-no, kiu ne nur ne protektis, sed ilin pri-zonigis kaj martirigis. Kaj en sia letero li kalumniis ilin tiel grave, ke la reĝo Vladislao Jagellona decidis fari ekzeku-ton de la ministoj – deputitoj.

La 11-a de la aŭgusto 1496… Kiam la tago sunigis la kastelon (en Poděbrady), estis el prizonejo forkondukitaj 10 ministoj, en blankaj mortkiteloj, tra la urbaj pordegoj, tra la Elbo-ponto al herbokampo, la loko destinita por fari la ekzekuton. Sub la granda, maljuna kverkoarbo. Onidire la sango de sen-kapigitaj ministoj ŝprucis tiom alte, ke ĝi atingis ĝiajn foliojn. Post la evento komencis pluvi, pluvis kaj pluvis dum naŭ tagoj, kion la popolo opiniis Dia ago. Post kelka tempo komencis ruĝiĝi la foliaro de la kverko kaj la arbo produktis glanojn, kiuj havis formon de homaj kranioj en ministaj kapuĉoj.

Ilin la poděbradanoj longajn tempojn konservis kiel talismanojn, kvankam la kverkoarbo pasis en la 17-a jarcento.

Alia relikvio, kiu estas ligita kun la evento, estas la rando de la puto, kiun eĉ mencias Komenio en sia libro „Pri gravaj okazaĵoj de religio ĉeĥa“

En ĝi li priskribas, kiel el la puto el-ŝprucis fonto de ruĝa akvo. La popolo opiniis tion sango de la ministoj… Sed estis tio la ferohava akvo, kiu ekfondis la famon de la banloko Poděbrady…

La alia vidindaĵo ĉi-koncerna estas preĝejeto, kiu staras kiel memento de la evento sur la loko, kie okazis la ekzekuto.

(Rim. En Poděbrady fariĝis nur ekzekuto de 10 ministoj, aliaj 3 estis fortrenitaj al Křivoklát, kaj tie ili estis ankaŭ senkapigitaj).

Finvorte: Espereble la partoprenontoj de la konferenco jam per propraj okuloj vidos la menciitajn lokojn, do estu nia artikolo ilia rememoro, kaj bedaŭromanko por la samideanoj, kiuj ne ekskursis tra la urbo.

M.T.

Katastrofo en Nepalo

Josef Kříž

Rilate al grandega naturkatastrofo, kiu okazis antaŭ kelkaj tagoj en Tibeto kaj Nepalo, mi ricevis informon de unu el niaj tri geamikoj el nepala ĉefurbo Katmanduo, kiujn ni gastigis ĉijare dum la 8-a ĝis la 10-a de aŭgusto en nia loĝloko – en la vilaĝo Strašov, ĉk. 25 km de Pardubice.



Kara Josefo, dankegon pro via zorgo. Jes okazis grandega katastrofo en Nepalo. Antaŭ kvar tagoj okazis grandega katastrofo. La rivero Bhotekoshi, kiu elfluas el Tibeto, estis blokita de granda terglito kaŭzita de neĝo kaj degelado. Samtempe okazis eta tertremo kun magnitudo de ĉirkaŭ 4,5. Oni ankoraŭ ne klare scias, ĉu la tertremo kaŭzis la tergliton aŭ ĉu la moviĝo de la terglito mem kaŭzis la lokan tremadon de la tero.

Post kiam la rivero estis blokita, formiĝis granda lago. La akvo ne povis longe resti en ĝi, kaj fine la digo cedis. Grandega kvanto da akvo kun granda forto fluis malsupren al la nepala flanko. Laŭ kelkaj informoj, la akvonivelo atingis eĉ ĉirkaŭ 200 metrojn.

La rivero Bhotekoshi fluas tra Nepalo dum ĉirkaŭ 150 kilometroj, kaj laŭ tiu tuta vojo okazis grandegaj detruoj. La regiono estas tre grava turisma loko. La fama celo de piedvojaĝantoj, Langtang, troviĝas en tiu regiono. Ankaŭ la 15a Internacia Himalaja Renkontiĝo organizita de Nepala E-Asocio (NEspA) okazis tie. Ni tiam restis en Syabrubesi, sed nun ni aŭdis, ke tiu hotelo estis forlavita de la inundo. Ŝajnas ankaŭ, ke la posedanto de la hotelo estas inter la malaperintoj.

Laŭ la nunaj informoj, miloj da homoj eble estas malaperintaj, kvankam la ĝusta nombro ankoraŭ ne estas konata. En tiu regiono troviĝas ankaŭ gravaj pilgrimejoj, interalie Gosaikunda, sankta lago en la Himalajo, ankaŭ la regiono de Monto Kailash kaj Manasarovar en Tibeto.

Multaj pilgrimantoj, kiuj vojaĝis al Manasarovar en Tibeto, devis veturi laŭ tiu rivero dum ĉirkaŭ 100 kilometroj. Laŭ la nunaj informoj, granda parto de tiuj pilgrimantoj estas malaperintaj. Laŭ la nuna statistiko, pli ol 600 pilgrimantoj estas ankoraŭ serĉataj. Same ankaŭ multnombraj turistoj el diversaj landoj. Sed pli multo estas el nia najbara lando Bharato.

Ĉiuj vilaĝoj kaj urbetoj laŭ la rivero Bhotekoshi estis grave trafitaj de la inundo. Ĝis nun oni trovis pli ol 600 kadavrojn. Multaj homoj ŝajne mortis pro la grandega forto de la akvo, kiu portis kun si grandajn ŝtonojn, kvanton da sablo kaj aliajn materialojn. Pro tio multaj el la trovitaj kadavroj estis grave difektitaj.

Multaj lernejoj, vilaĝoj, elektrocentraloj, pontoj, agrikulturaj kampoj, policaj oficejoj kaj doganaj oficejoj estis detruitaj aŭ forlavitaj. Tiu vojo estas la ĉefa konekto inter Nepalo kaj Ĉinio por kulturo, religio, turismo kaj komerco. Ankaŭ granda nombro da aŭtoj importitaj el Ĉinio estis forportita de la inundo.

La informoj el la tibeta flanko venis iom malfrue. Pro tio multaj homoj en Nepalo nur ekvidis la danĝeron nur kiam la inundo jam komenciĝis. En la pli malaltaj lokoj oni tamen avertis la loĝantojn, sed multaj homoj ne kredis la avertojn, ĉar ili ne povis imagi, ke la inundo estos tiel grandega. Krome, tiutempe eĉ ne pluvis, kaj pro tio la homoj ne atendis tiel grandan katastrofon.

Antaŭ du jaroj okazis inundo en la sama regiono. Ĝi ankaŭ kaŭzis konsiderindajn damaĝojn, sed ĝi estis multe malpli granda ol la nuna katastrofo.

Ĉi-foje la temperaturo estis nekutime alta. Pro la varmo okazis rapida degelo, kiu eble kontribuis al la terglito. La terglito blokis la riveron kaj formis grandan lagon. La lago ne povis reteni la grandegan kvanton da akvo, kaj fine ĝi rompiĝis, liberigante grandegan akvokvanton malsupren laŭ la rivero.

Hodiaŭ mi proponis al mia asocia kolegio kolekti helpon por la viktimoj. Ni jam kolektis ĉirkaŭ 500 usonajn dolarojn kaj aldonis ilin al la fonduso de la Ĉefministro por helpi la viktimojn. Ni ankaŭ planas kolekti monon nome de Nepala Esperanto-Asocio kaj kontribui al la helpo por la viktimoj de tiu grandega katastrofo.

Tiuj, kiuj volas helpi, bonvolu skribi al mi. Mi kolektos la tutan sumon kaj poste transdonos ĝin al la koncerna fonduso aŭ helpkomisiono. Ni fidas je la nuna registaro kaj esperas, ke ĝi faros ĉion eblan por helpi la viktimojn kaj rekonstruos la detruitajn regionojn.

NEspA estis fondita laŭ la kondiĉoj de la nepala registaro. Tial estas nia devo helpi la registaron kaj la popolon en tia malfacila situacio. Kiam ni renovigas nian asocion, ni devas raporti ankaŭ pri nia socia laboro. Do, por plenumi nian respondecon kaj montri nian solidarecon, NEspA decidis kolekti monon kaj kontribui al la helpo por la homoj, kiuj perdis siajn familianojn, hejmojn kaj vivrimedojn. Multaj familioj perdis plurajn membrojn, kaj multaj aliaj homoj estas vunditaj.

Mi daŭre informos vin pri la situacio, kiam mi ricevos pli da fidindaj informoj.

Kore, Bharat Kumar Ghimire,
prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio
nespa_bharat@hotmail.com

P.S. Laŭ la ĝisnunaj informoj, neniu membro de NEspA estas viktimo de la katastrofo. Tamen ni devas ankoraŭ atendi, ĉar la situacio ne estas plene klara. En Nepalo estas multaj esperantistoj, kaj ne ĉiuj estas membroj de NEspA aŭ aktivaj membroj. Krome, nun estas periodo de religiaj festoj, kaj pro tio ni eble bezonos iom da tempo por kontakti ĉiujn kaj kontroli, ĉu ĉiuj estas en ordo.

Co dělá výbor

Výbor se sešel virtuálně 18.5., 16.6. a fyzicky v Chocni 18.7. Projednal:



- Vznik české sekce ILEI
- Návrh na interlandaj kunsidoj
- Příprava konference v Poděbradech
- Vrácení busty Zamenhofa a pořízení vlastní
- Česko-německé setkání v Olomouci
- Jak naložit s fotkami ze starého webu kvůli autorským právům
- Zřízení termínovaného účtu u FIO-banky
- Příprava na Movada Foiro v Grazu
- Obavy, aby nový zákon o neziskovkách neohrozil fungování či existenci svazu
- Zkoumání možnosti konference ve Valticích 2027
- Nabídka P. Chrdleho na odkoupení knih svazem se slevou
- Zhodnocení Reta Babilado
- Náhrada úložiště NAS za Google-disk
- Ukázka použití umělé inteligence
- Placená reklama kurzů na Facebooku
- Návrh usilovat o zařazení esperanta do Nemateriálního kulturního dědictví
- Požádat o knihy z Apogo Bachrich

Vyšlo nové číslo Unesko-kuriero v esperantu



Tentokrát věnované archeologii jako živé minulosti.

Co obnáší zápis do Nemateriálního kulturního dědictví

- vyplnit přihlašovací formulář
- prokonzultovat ho s Národním ústavem lidové kultury
- předložit ministerstvu kultury
- pravidelně, nejméně po 7 letech, poslat redokumentační zprávu, že zapsaný kulturní statek žije a rozvíjí se

(Zápis se již zdařil v Polsku, Chorvatsku a Rakousku).


JUBILEANTOJ DE JULIO, AŬGUSTO KAJ SEPTEMBRO 2026

Miroslav Čegan, Kladno
Alice Dudová, Ostrava
Jiří Fanta, Strážnice
Ing. Vratislav Hirš, Drnovice
Josef Hofman, Plzeň
PhDr. Petr Chaloupka, Praha
Marcel Jelšík, Hluboká nad Vltavou
Ing. Jiří Kortus, Blatná
Jan Kukla, Praha
Marie Linhartová, Pardubice
MUDr. Jana Pivoňková, Brno
Jana Plamínková, Strážnice
František Pohorský, Zlín
Ing. Rudolf Rychlý CSc., Ústí nad Labem
Čestmír Suchý, Sokolov
Milena Takáčová, Uničov
Hana Třetinová, Havířov
Ivana Vítková, Černošice
Jiří Machačík, Olomouc
Ing. Alžběta Citavá, CSc., Praha-Horní Měcholupy
Nikola Rehbergerová, Hranice-Město
Ing. Jana Zigal, Brno

Fartu bone, jubileantoj, estu sanaj, ĝojaj kaj sukcesaj!

Nova libro de Věra Ludíková

La poetino, amikino de Esperanto, eldonis ĉeĥlingvan libron **Eventa horizonto**, pri nigraj truoj. Kio restos post ni, kiam mortos la homaro? Ŝi filozofias pri la Universo, pri la homaro kaj nia nacio.



Ján Maliarik (1869-1946)



Rememoru slovakan esperantiston-pacifiston, kiu proponis Tutteran ŝtaton por forigi la militojn. Li forpasis antaŭ 80 jaroj la 14-an de julio 1946.

Medalo al V. Kočvara

Inter pasintnumere menciitaj jubileuloj estis iama ĈEA prezidanto V. Kočvara. La Ĉeĥa Numismatika Asocio (Česká numismatická společnost), filio en Opava, emisiis honore al la jubileanto medalon, kiu mencias ankaŭ lian esperantistecon. Sur la dorsa flanko estas kune kun aliaj nacilingvaj tekstoj ankaŭ „*..lingve esperantisto*“. Do, jen bona agnosko de nia lingvo flanke de ne-esperantista organizaĵo.



Probal Daŝgupta
1953 – 2026

Prezidanto de la Akademio kaj eksa **prezidanto de UEA** (2007-2013) naskiĝis la 19-an de septembro 1953 en Kolkato (Hindio) kaj forpasis la 1-an de junio 2026 samloke.



Esperanton li lernis kiel 14-jarulo kaj en la aĝo de 17 jaroj li aktive korespondis kun Kolomano Kalocsay pri komplikaj gramatikaj problemoj ĉe tradukado de Tagore.

Lingvisto kaj leksika esploristo, li studis en la sanskrita kolegio de Kolkato, la dekana kolegio de Puneo kaj doktoriĝis ĉe la Universitato de Novjorko pri la genera sintakso de la bengala lingvo. Li instruis lingvistikon en pluraj barataj universitatoj, laboris kiel profesoro pri aplika lingvistiko ĉe la Universitato de Hajderabado kaj poste okupiĝis pri leksikaj esploroj en la Barata Statistika Instituto en Kolkato, post kio li emeritiĝis en 2018.

Liaj tradukoj al Esperanto: ***Primico*** (1977), ***Mi juna*** (1989), ***Klera edzino*** (1994), ***Dormanta hejmaro*** (2006), originale ***Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo*** (2011).

Plurajn verkojn li male enbengaligis el Esperanto.

Kiam Edmund Grimley Evans esperantigis libron de la mondfama lingvisto Noam Chomsky **Lingvo kaj menso**, Probal Daŝgupta petis la eldonpermeson kaj Chomsky ĝin tuj donis.

Laŭ GK 1303


Przemysław Wierzbowski
(1986 - 2026)

La 39-jara pola junulo estis tre promesplena por la pola movado.



Prezidanto de de Bjalistoka Esperanto-Societo, redaktoro de almanako **Bjalistokaj Kajeroj**, aŭtoro de **Konfuziloj** (similaj vortoj kiel deserto / dezerto), tradukinto de la fama scienc-fikcia romano de Stanisław Lem **Solaris.**





La plej famaj verkoj de Pŝemek.



■ La 16-an de julio 2026 forpasis **Miroslav Volný** el Frýdek-Místek

■ La 22-an de julio 2026 mortis en Bratislava **D-ro Arnold David** 93-jara


■ La 16-an de aŭgusto 2026 forpasis **Martin Stuppnig**, pri kiu ni informas sur p. 71 (novaj honoraj membroj de UEA) kaj en Starto 3/2025, p. 92-93, okaze de lia 100-jariĝo.

Miroslav Smyčka – 100 jaroj

1926 – 2017

Miroslav Smyčka postlasis propran biografieton, en kiu li forgesis diri, ke ekde 2002 li estis honora membro de ĈEA. Li forpasis la 25-an de aprilo 2017.

Mi naskiĝis la 11-an de septembro 1926 en Olomouc – frekventis realgimnazion en Brno, en la j. 45-49



universitaton samloke (filozofion + filologion), antaŭ la abiturientiĝo eksigita dum politika enketo – studinte samtempe kanton kaj muzikteorion en muziklernejo kaj konservatorio engaĝita ekde 49 en la operĥoro de Ŝtata teatro en Brno – post militservo kontinuis en operĥoro de Silezia teatro en Opava – ekde 53 komenciĝis mia kariero de opersolisto en operejoj de Liberec, denove Opava, Čes. Budějovice kaj Ústí n. Labem – post mia emeritiĝo transloĝiĝis al Č. Budějovice, kie ĝis nun kantas kiel eksterulo en la operĥoro.

Mi esperantiĝis en la 50-aj jaroj en Opava, membris tiean klubon, samkiel poste en 60-aj j. en Č. Budějovice. – Translokiĝinte en j. 70 al Ústí n. L. mi komencis aktivi kiel E-a kantisto kaj deklamisto lige kun E-poeto kaj kantpoezia tradukisto Jiří Kořínek + lia bofilo, E-a publicisto Vlastimil Novobilský. – En la j. 71 mi kante partoprenis UEA-K en Londono, en 73 en Beogrado, poste kiam E-o fariĝis (ĉe ni post fera kurteno) „danĝera lingvo“, mi sukcesis kiel kantisto elvojaĝi nur al UK en Varna (78) kaj Rotterdam (88) kaj post la falo de fera kurteno al Vieno (92) – fine ĉe ni en Prago. – Krome mi kantis kaj deklamis dum pluraj fakaj kongresoj (SAT, IKUE, KELI, IFEF) kaj kelkaj naciaj kongresoj.

En Ústí n. L en 80-aj jaroj komenciĝis ĉiujara tradicio de 19 (ĝis 2007). E-aj kulturaj festivaloj, origine dediĉitaj al 2 korifeoj de nialanda E-a kulturo, Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr, al kiuj mi kontribuis kante, deklame, kiel programdirektoro kaj sekretario. – Simile mi tie aktivis ĉe alia internacia aranĝo, lanĉita antaŭ 20 j. en tiama GDR – nome ĉe „Ĉeĥa-saksa tago“ – okazinta alterne en najbara Saksio aŭ ĉe ni. En Ústí ĝi konsistis regule el prelega matineo kaj el bunta kultura programo.

En la E-klubo de Jiří Kořínek en Ústí n. L.mi dum pluraj jaroj funkciis kiel klubestro, dum kelkaj gvidis kurson kaj ĉe mia adiaŭo en la j. 2004 mi ricevis titolon de „honora prezidanto“.

(M.Smyčka)

Atentu rememorojn pri Smyčka:
6.9.2026 post 9:45 fine de la televida programo **ČT1** „**Kalendárium**“ M. Smyčka aperis kiel enigmo „Kiu li estis“? Eblos sekve spekti en iVysilani.cz.

Rememora muzika vespero pri li okazos 1.10.2026 ekde 19:00 en la **teatro U Valšů** en Prago. Eksonos en Esperanto i.a. operarioj el lia repertuaro kaj kantoj de Semafor en prezento de liaj familianoj. Pri la detaloj sekvu Kalendaron en Esperanto.cz.

La 74a Kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia

Oldřich Arnošt Fischer


Temo de la kongreso, kiu okazis ekde la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto 2026, estis „**La Biblio – ponto inter la kulturoj**“.

Oni ĝin dediĉis al la 100-a datreveno de la Esperanta Biblio. Görlitz troviĝas en la federacia lando Saksio, ĉirkaŭ 100 kilometrojn oriente de Dresdeno kaj 90 kilometrojn de Berlino. Ne hazarde oni elektis por la kongresejo la urbon, kiu longtempe estis dividita, sed nun la germanan kaj polan partojn (Görlitz / Zgorzelec) unuigas ponto super la rivero Luzacia Niso, kiu estas simbolo de eŭropa unueco.

En la Kongreso partoprenis pli ol 40 esperantistoj, kiuj devenis el 12 landoj (Ĉeĥa Respubliko, Francio, Germanio, Hungario, Kubo, Madagaskaro, Nederlando, Pollando, Rumanio, Slovakio, Svedio kaj Svisio).

Interesaj estis precipe enkonduka prelego de Phillipe Cousson, prezidanto de KELI, la prelego pri historio de Biblio (Ágnes Ráczkevy-Eötvös), kiel la Biblion legas judoj (rabeno Akiva Weingarten) kaj pri la ĝis nun lasta eldono de Biblio en 2006 (Petr Chrdle).





Ni faris ekskursojn al urbeto Herrnhut (ĉeĥe Ochranov), kien en la 17a jarcento ekziliĝis membroj de la eklezio Moravia Kunfrataro kaj kie oni fabrikas grandajn paperajn moraviajn stelojn, kiuj kontribuas al kristnaska etoso, urbo Dresdeno, cisterciaka monaĥinejo Marienthal apud urbeto Ostritz kaj Sankta Tombo.

En Silezia Muzeo ni instruiĝis pri historio de Silezio. Survoje al Supernisa Parko ni iris preter la domo de loka filozofo Jakob Böhme (1575-1624).

Pianaj virtuozinoj Aleksandra kaj Julia Czajka ĉiujn ravis per sia muziko. Stephan Lepping gvidis provkantadon kaj lia orgena muziko akompanis matenajn kaj vesperajn preĝojn. Dum la kongreso nin amuzigis muziko kaj kantoj de frisia artista dueto Kajto (Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma).

La kongreso kontribuis al la kompreno inter kristanoj el diversaj landoj.

PREMIOJ PIRLOT KAJ POWER

La **Premio Pirlot** estas dediĉita al la plej bonaj sciencaj libroj en Esperanto. 1-a: “**Santeni vian vivradikon**” de Wang Disheng (2021); 2-a: la libro de la **79-a IKU-sesio** (2026); kaj 3-a “**Spacvojaĝado kaj Esplorado: de Sputnik ĝis Webb**” de Amri Wandel (2025).

La **Premio Power** estas destinita al la plej bonaj sciencaj prelegoj. 1-a loko, **Věra Barandovská-Frank** (*Panslavismo en Habsburga monarkio*); 2-a, **Humphrey Tonkin** (*Walt Whitman: Poeto de la Nova Usono*); kaj 3-a, **Gim Inhong** (*Psikologia valoro de Zamenhof-proverbaro!*). La **premion Power por mallongaj prelegoj:** 1-a, **Peter Baláž** (*AI-revolucio kaj Esperanto*); 2-a, **Heidi Goes** (*Frua skribita literaturo en lingvoj de la Konga Lingvo-Areto*); kaj 3-a, **Joël Fontaine** (*Ondoj: danĝeroj kaj utiloj*).

Usona kongreso

Matyáš Elicer

Ĉi-jaran printempon, mia delonga koramikino invitis min al landa esperantista kongreso okazanta en Usono, en la bela urbo Klevlando.

La 16-hora vojaĝo iris tre glate, almenaŭ ĝis kiam mi atingis mian celon: la flughavenon en Dalaso-Fortvorto.

Post kelkaj tagoj atendis nin vojaĝo de Teksaso (suda subŝtato) al Ohio (norda subŝtato), kie okazis la kongreso. Ĉar ni ambaŭ amas aventuron, ni elektis 26-horan vojaĝon per aŭtobuso.




Unu el miaj celoj estis kunporti kaj konigi almenaŭ kelkajn pecojn de ĉeĥa kulturo. Por nia vojaĝo, mi pretigis sandviĉojn kun omleto, pakitajn en aluminio. Plejparto de vi eble imagas en tia ekskursa sandviĉo anstataŭ omleton viandotranĉon frititan en trikovro. Mi ne scias, ĉu omleto estas simile populara elekto, sed almenaŭ en mia familio ĝi dum mia infanaĝo estis.

Dum la unua vespero en la kongresa gufujo (kiun la usonanoj ankaŭ nomis „aglujo“), mi enkondukis niajn nordamerikajn samideanojn al la ĉeĥa kartludo „Pluvas!“, kiun vi sendube bone konas. Mia alia kultura elportaĵo, ŝtrumpetoj en sandaloj, rapide iĝis malpermesita de mia koramiko.



La tuta kongreso okazis en plaĉa, amika etoso. Por tiom multhoma lando kiel Usono, surprize (aŭ eble nesurprize, se ni konsideras ankaŭ ĝian mirindan vastecon) venis malpli ol cent esperantistoj. Sed tio neniel malhelpis evento-plenan programon. Okazis samtempe interesaj prelegoj kaj aktivadoj, el kiuj mi povis nur parton partopreni, kaj ne povus ĉiujn laŭmerite priskribi.

Sed mi menciu almenaŭ amuzan prelegon dum kiu oni strebis verki sian propran etnovelon, interesan resumon de la historio de Esperanto-USA (iam disvojiĝinta al du apartaj organizaĵoj), esploron pri historio de Esperanto kaj Lidia Zamenhof en la subŝtato Ohio, kaj konatiĝon kun la diverse utila agado de la fondaĵo [Esperantic Studies Foundation]. Okazis ankaŭ lernaj ludoj kaj debato pri artefarita inteligenteco.



Tre memorinda sperto estis la festo de la 250-a datreveno de Usono, kiun ni pasigis sur ŝipo sur la grandega Eria lago. Oni bone manĝis, dancis, kaj spektis artfajraĵojn en la proksima urbo Klevlando. Alia novaĵo por mi estis la malsolena fermo de la kongreso, per kiu oni strebis egalpezigi formalecon de la solena malfermo – miaopinie tre sukcese.



Kelkaj kongresanoj pretigis mallongan prezenton de siaj talentoj por amuzi ĉiujn partoprenantojn, kaj oni eĉ disdonis kelkajn surprizajn premiojn al la partoprenantojn. Mi ricevis pro mia deforeco ĉarman historian gvidlibreton, kio estis tre afabla gesto de la organizantoj.

Mi volas emfazi, ke ĉiuj kongresanoj, kiujn mi kunparolis, estis tre amikaj. Ankaŭ homoj ekster la kongreso plej ofte kondutis tre afable al mi. Eniri Usonon povas esti iom penige kaj malfacile, sed sukcesinte tion, oni povas malkovri tre bonvenigan landon kun multaj bonkoraj homoj! (Almenaŭ se oni evitas longajn vojaĝojn per aŭtobuso.) Krom tio, la strangaj usonaj mezurunuoj, la abundeco de aŭtovojoj, kaj la vastiĝo de kelneraj krompagoj de restoracioj al preskaŭ ĉiuj butikoj, aferoj ne ŝajnas tiom fremdaj trans la „granda flako“.

Eble iuj el vi scivolas, kiom ofte uziĝis la angla lingvo dum la kongreso. Mi povas tre feliĉe diri, ke krom la komenca anglalingva prelego, apenaŭ! La usonaj esperantistoj estis surprize nekrokodilemaj. (Eble iom helpis tion la nedeviga punludo, per kiu oni volis malkuraĝigi krokodiladon.) Kaj mi ankaŭ fieras diri, ke eĉ ekster la kongreso, la plej abunde uzata lingvo dum mia unua vizito al la „Nova mondo“ estis Esperanto, kaj ne la angla (kiun mi ankaŭ parolas).

Revenante al Ĉeĥujo, mi kunportas multajn belajn memorojn, plivigligitan amon al la tutmonda esperantista komunumo, kaj espereble nemalvigliĝontan amon de mia koramikino, kiu konsentis iĝi ankaŭ mia fianĉino. Mi tre antaŭĝojas miavice montri al ŝi la belojn de nia lando!

Se vi volus viziti Usonon, vi verŝajne ne bezonas timi, sed mi rekomendas, ke vi bone kolektu kaj presu ĉiujn haveblajn informojn pri via tuta vojaĝo, ĉar kapricoj de modernaj teĥnikaro kaj doganistaro estas neantaŭvideblaj. (Trairinte la sekurecan kontrolon en flughaveno de Václav Havel, mi rimarkis, ke mia telefono mortis kaj ne startas.)

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010.** Do Zprávy pro příjemce uvedte jméno a příjmení a účel platby (např. **Jan Novák, členství ČES**). Pokud platíte za klub nebo sekci, uveďte své jméno a pošlete seznam za koho platíte na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz.

Můžete, ale nemusíte, jako variabilní symbol použít čísla níže uvedená, případně své členské číslo:

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06946 konference/sjezd ČES
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50800 sekce nevidomých LIBE
Své účty mají KELI a IKUE
51000 sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
51100 sekce katol. esp. IKUE
vlastní b. ú. 1647837113/0800

Jak připravit materiály pro státní archívy

Archívy v Plzni a Opavě vlastní četné esperantské materiály. Pokud také uvažujete o předání do archívu, vaše materiály nesmí mít nic kovového (sponky, drátky ze sešívačky), protože časem rezivějí, ani nesmí být v plastových obalech, nýbrž jen v papírových obálkách.

Návod ke stažení

Předplatné časopisů

Jak objednat

Do emailové objednávky uveďte jméno, příjmení, poštovní adresu nebo emailovou adresu, objednávaný titul. Svou objednávku zašlete Janě Zigal na email peranto@esperanto.cz

Pak zaplaťte částku pro daný časopis a typ předplatného na účet svazu **2800186228/2010** a do **Zprávy pro příjemce** uveďte: jméno, příjmení, časopis, rok. Příklad:
Jan Novák, předplatné Monato 2026

Monato: 1456,- Kč (pozemní poštou), 1506,- Kč (letecky), 879,- Kč (elektronicky), 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

Juna Amiko: 350,- Kč, elektronicky 190 Kč, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1500,- Kč (1000,- Kč pro členy „Esperanta Civito“), 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (elektronicky nevychází)

La Ondo de Esperanto vychází pouze elektronicky ve třech kategoriích:
1. Abonanto – 400 Kč
2. Amiko – 800 Kč
3. Patrono – 2600 Kč

Komercaj anoncoj en Starto: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.
57. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 300 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2026

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 57-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 13 eŭroj, ekster Eŭropo 15 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,

Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva numero: 15.11.2026

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO 2026 /2027

2026-09-25/28 Konferenco de ĈEA en Poděbrady, komitato@esperanto.cz
2026-10-05/07 Konferenco de fervojistoj en Krkonoše, annaabelovska@seznam.cz
2026-11-29 Kreado de bondeziraj donacetoj en Svitavy (9–16h)
2026-12-06 Marcipana Kristnasko en Svitavy (9–16h), svitavy@esperanto.cz
2026-12-15 Zamenhoffesto en Prago
e-mentalprago@seznam.cz

EKSTERLANDE (Elekto precipe laŭ Eventa Servo)

2026–09–24/28 Beneluksa Kongreso, De Haan, piet.glorieux@gmail.com
2026–10–18/23 14-a E-Migrado Aŭtuna, Naundorf, Germanio – landlime kun Ĉeĥio, www.esperanto.de/eo/ema
2026-12-5/6 Granda lokŝumado en Nitra
e-mentalprago@seznam.cz
2026-12-12 Zamenhoffesto en Vieno
aef@esperanto.at
2026-12-2-2027-01-03 23-a Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden (Germanio)
esperanto.land/nr

2027

2027–05–14/17 Eŭropa Kongreso de Esperanto, Carry-Le-Rouet, Provenco (Francio) https://kongreso2027.esperanto-france.org/eo/
2027-06-05/11 78a IFEF-Kongreso en Selva da Val Gardena (Italio – Suda Tirolio), http://ifef.free.fr/spip/
2027–07–03/10 112-a Universala Kongreso de Esperanto, Melburno/Narrm (Aŭstralio) https://uea.org/kongresoj

Časopis o mezislovanském jazyku

https://slovjani.info/

Vychází od roku 2016. Na webu jsou ke stažení archivní čísla. Redakce zve k publikování odborných článků.



Ankaŭ ĉi-jare esperantistoj grimpis sur la monton Ĉantorio (26 junio 2026)



Klubanoj de Svitavy en Šumava



foto Huang

Komuna foto de UK en Graz



Vlado Rataj

Eksaj tendaranoj en Lančov
14 – 16 aŭgusto 2026



Orfejo Klara Zamenhof en Kongo
https://mallonge.net/1ou
augukako@gmail.com



Esperanto-familioj en Kapral-muelejo apud Brno
(2 familioj kaj 1 skoltestro estis el Ĉeĥio)